

Wilhelm Busch,
Maks kaj Moĉjo, Antaŭparolo

tradukita de Pejno Simono

Ho, ni ofte aŭdas, iam legas,
ke infanoj malbonegas.
Jen ekzemplo el la vico -
nome Makso kaj Morico.
Neniam estis pliboniĝo
malgraŭ saĝa admoniĝo.
Ofte ili tion ridis
kaj sekrete eĉ ĝojiĝis.
Jesante malbonagon, ili
ĉiam pretis tiel brili.
- Torturi bestojn, tedi homojn,
ŝteli pirojn, prunojn, pomojn -
vere plaĉis tiom forte.
Krome estis pli komforte,
ol en kirko aŭ lernejo
malmoviĝi sur sidejo.
Sed ve, ho ve! - Kiam tamen
mi rigardas al la amen.
Aĥ, tiu estis grava kaĉo,
kiel fartis Moĉj' kaj Maĉjo.
- Tial ili jen pentrotaj
kaj la agoj priskribotaj.

*Traduko de la Germana poemo "Max und Moritz, Vorwort" de WILHELM BUSCH (*1832-04-15 - †1908-01-09) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-973-1968 (2014-03-14 10:14:06)